
Itala Kongreso en Triesto 8/19

inventis la unuan kurradon, pri la akcidentemo dum bremsado ĉe altbiciklo (kion kaŭzis al la biciklanto faladon antaŭen pro la antaŭenigo de la pezocentro dum tro forta bremsado), pri la danĝereco de la unua serie fabrikita motorciklo de la firmao Hildebrand & Wolfmüller, el kies motorcikloj trio-no iam ekflamiĝis, ĝis la diversaj produktmanieroj de motorcikloj kaj aŭtomobiloj en la orienta kaj okcidenta partoj dum la tempo de du germanaj ŝtatoj. Oni multe pli longe povus aŭskulti la rakontojn, sed subite estis fino kaj kelkaj certe duan fojon revizitos la PS.Speicher.


Informstando dum la tago de la kulturoj en Hess. Oldendorf 9/19



Dum la tagmanĝo en la plej malnova restoracio de Malsupra Saksio ankaŭ estis ebleco por interŝanĝi spertoj kaj aŭkulti novaĵojn el Esperantujo. Sufiĉe novaj ja estas la kalendaro pri renkontiĝoj eventaservo.org kaj la nova ludo por smartfonoj „Vortludo“, kiu simile funkcias kiel Skrablo: vortludo.com .

Posttagmeze okazis ĉiĉeronado tra la historia urbocentro de Einbeck. Estas vere ĉarma urbeto kun la plej longa strato kun ligitaj trabfakaj domoj




16-a Rata Rendevuo en Einbeck



en norda Germanio kaj kun interesa historio, ne nur pri biero kaj mustardo. Imprese, kiel kunhelpas la enloĝantoj por konservi la historiajn konstruaĵojn kontraŭ kadukiĝo kaj rebriligi la domojn, ekz. la Eickesches Haus. Dum kafumado kaj manĝado de bongustaj tortoj en la kafejo Steinhaus oni ankoraŭ iom povis babili pri eventoj kaj vojaĝoj venontjare. Kelkaj planas vojaĝi al la UK en Montrealo, al la Transponta Kongreso en Frankfurt/Odro aŭ la Itala Kongreso en Assisi. Kaj post bela tago dum adiaŭo oni promesis ankaŭ venontjare denove veni al la Rata Rendevuo. Informoj pri la renkontiĝoj de la Ratkaptista Bando en Hameleno ĉiam ankaŭ troveblas sur la paĝoj esperanto.de/hameln kaj eventaservo.org/o/RB .




Esperanto – La Ratkaptista Bando – Esperanto-Gruppe Hameln

# RATKAPTISTA KURIERO

## INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 62 OKTOBRO 2019



Kontakt: Heinz W. Sprick hameln@esperanto.de
www.esperanto.de/hameln Tel:0162/7536396


## Termine 2019/2020 mittwochs 19.00-21.00 Uhr

**Sumpfblume Hameln**

**2019: 30. Okt., 13. Nov., 27. Nov., 11. Dez., Weihnachtspause, 2020: 8. Jan., 22. Jan., 29. Jan., 12. Feb., 26. Feb., 11 Mrz., 25. Mrz., 8. Apr., 22. Apr., 29. Apr., 13. Mai, 27. Mai, 10. Jun., 24. Jun., 8. Jul., 22. Jul., Sommerpause, 9. Sep., 23. Sep., 30. Sep., 14. Okt., 28. Okt., 11. Nov., 25. Nov., 9. Dez., Weihnachtspause**

*Das aktuelle Programm unter: esperanto.de/hameln + eventaservo.org/o/RB*

**13. Dez.: Weihnachtsfeier im Pfannekuchen, 29. Jan. Jahreshauptversammlung, 20.-24. Mai BARO auf dem Finkenborn,**

## Neuer Esperanto-Kurs startet ab März 2020!

**13.12.2019 - 18.00 Uhr - Weihnachtsfeier der Esperanto-Gruppe Hameln und vom Landesverband Niedersachsen EMAS im Pfannekuchen, Hameln**



Alle Mitglieder, Kursteilnehmer, Interessenten und Freunde sind herzlich eingeladen zur Weihnachtsfeier der Esperanto-Gruppe Hameln und des Landesverbands Niedersachsen EMAS. Bringt bitte ein kleines "Schrottwichtelgeschenk" mit, das in den großen Sack kommt und dann erwürfelt wird. Wir wählen auch wieder das "Esperanto-Wort des Jahres". Wir freuen uns auf einen schönen Abend. Bitte anmelden bis 10.12. bei Heinz-Wilhelm Sprick oder per Doodle-Liste https://doodle.com/poll/9axt4x2yiyn2hpif .

## Einladung zur Jahreshauptversammlung 2020:

am: **29. Januar 2020** um: **19 Uhr** in der **Sumpfblume** in Hameln

Tagesordnungspunkte: Begrüßung, Jahresbericht, Kassenbericht, Bericht der Kassenprüfer, Entlastung und Neuwahl des Vorstands, Wahl eines Kassenprüfers, Anträge, DSGVO (Datenschutzgrundverordnung), Planungen 2020, Verschiedenes




Ni homoj estas inteligentaj kreitaĵoj. Kiel ĉiuj aliaj estaĵoj, ni manĝas kaj trinkas por kreski korpe, ĝis nia maturiĝo, kiam ni estas ĉirkaŭ 20-jaraj. Tamen, nia menso (aŭ spirito, animo) povas ĉiam plu-kreski kaj evolui kaj lerni tutvive. Tamen, multaj homoj laboras tuttage kaj vespere sidas ĉe televidilo aŭ komputilo ĝis enlitiĝo. Certe televido kaj intereto ofertas interesajn aferojn, sed nia korpo post finkresko bezonas plian ekzercadon, same kiel nia menso, por resti sana. Gravas do okupiĝi pri plej diversaj aferoj en la vivo, kiuj devigas nian korpon moviĝi de unu loko al la alia, kaj kiuj permesas al ni persone plu-evolui pliriĉigante niajn konojn kaj spertojn. Estas pruvite krome, ke ju pli ni aktivas kaj korpe kaj mense, des pli longe kaj sane ni vivas. https://movado-sen-nomo.weebly.com/


Antaŭkristnaska festo en la Cazador 12/18

## Esperanto-Kalender:
## eventoj.hu/kalendaro.htm
## + eventaservo.org/

2019: **1.-3.11. DEB-Verbandsratssitzung, Herzberg/Harz;** 1.-3.11. KKPS Klaĉ-Kunveno Post-Somera, Bodegraven, Nederlando; 7.-10.11. 6-a Internacia Lernejo de Esperanto, Bartošovice, Ĉehio; **8.-10.11. Esp.-Wochenendkurs, Herzberg/Harz;** 9.-11.11. GRUPE- Gliwice'a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto, Gliwice, Pollando; 22.-24.11. Studosemajnfino, Bornerbroek (apud Almelo), Nederlando; 30.11. 51-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO, Roterdamo, Nederlando; **13.-15.12. GEA-Klerigmodulo kun Zamenhoffesto, Herzberg/Harz;** 13.-15.12. 20-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj, Bjalistoko, Pollando; 14.-15.12. 7-a Granda lokŝumado en Bratislavo, Slovakio; 20.-22.12. Semajnfino kun opero Sternenhoch, Prago, Ĉehio; 21.-27.12. 7-a Afrika Kongreso de Esperanto, Buĵumburo, Burundo; **27.12.19-3.1.20 11-a Junulara Esperanto-Semajno, JES, Karłów, Pollando; 27.12.19-3.1.20 18-a Novjara Renkontiĝo (NR), Wiesbaden; 28.12.19-3.1.20 Luminesk', Nördlingen;** 31.12.19-5.1.20 Novojarsk 2020, Barnaul, Rusio;


Vizito ĉe Alexandra en Königswinter 1/19

2020: 15.-22.2. 27-a E-Korusa Staĝo ĉe Pireneoj, La BASTIDE/Hers, Francio; **17.-19.1. Esperanto-kursoj por progresantoj kaj fluparolantoj, Sundern, Sauerland; 21.-23.02. Weiterbildungsseminar Herzberg;** 26.2.-8.3. Kvara Speciala Ekskurso 2020, Nepalo; **6.-8.3. Wochenendkurse Herzberg;** 25.-29.3. Bibliaj Tagoj, Worms; 29.2.-7.3. Mediteranea Esperanto-Semajno MES 2020, Les Issambres ĉe la Lazura Marbordo, Francio; 2.-5.4. 21-a Israela Kongreso, Telavivo, Israelo; 27.-30.3. 13-a Mezorienta Esperanto-Kunveno, Çeşme, Turkio; **6.-13.4. 36-a PSI - Printempa Semajno Internacia, Wittenberg;** 17.-19.4. 101a Brita Kongreso, Leicester, Britio; 17.-25.4. 10-a PRINTEMPaS, Baugé, Francio; 30.4.-3.5. Printempa Esperanto-Renkontiĝo PEKO, Tilff, Belgio; 30.4.-4.5. 79a Hispana Esperanto-Kongreso, Comillas, Kantabrio, Hispanio; **1.-3.5. Weiterbildungsseminar Herzberg;** 1.-5.5. Mez-Azia Kunveno, MAK - en Duŝanbeo, Taĝikio; 1.-10.5. Mirinda Lviv, Lviv, Ukrainio; 2.-5.5. 16a Internacia Esperanto-Renkontiĝo de Meditado, Gangneung, Sudkoreio; 7.-10.5. 2-a Eŭropa Civitana Renkontiĝo, Laborateliero "Esperanto kaj Eŭropo" kadre de "Kleriĝo kaj Lingvoj", Kassel; **17.-24.5. Teo, amo kaj mondo, Ĉina Te-festivalo Herzberg; 20.-24.5. 61-a BARO, Hameln; 29.5.-1.6. Transponta Esperanto-Kongreso, Frankurt (Oder), Germanio kaj Słubice, Pollando (bis 5.6. auch dort 72-a IFEF-Kongreso);** 4.-11.7. 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET-56, Priekuli, Latvio; **10.-26.7. Esp.-Sommerkurse Herzberg;** 10.-19.7. Rusiaj Esperanto-tagoj - 2020, Krasnojarsk, Rusio; **11.-18.7. 76-a Internacia Junulara Kongreso, IJK, Someren, Nederlando;** 13.-21.7. 43-a SEFT Somera Esperanto Familia/Feria Tendaro, Thomsdorf; **18.-26.7. Somera Esperanto-Studado (SES), Kroměříž, Ĉeĥio;** 18.-21.7. Varmaj Tagoj - Urbe kaj nature, Halbe ĉe Berlino; 23.-26.7. Fieru! - La GLATa Esperanto-Renkontiĝo, en la Esperanto-Stacio en Halbe ĉe Berlino; 23.7.-2.8. Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj, Ispánk, Hungario; 25.7.-1.8. 93-a SAT-Kongreso; Bjalistoko, Pollando; 25.7.-1.8. 53-a ILEI-Kongreso, Québec, Kanadio; 28.7.-7.8. Milan Zvara, Esperanto-piedmarŝo en Karpata montaro, Ukrainio; **1.-8.8. 105-a Universala Kongreso de Esperanto, Montrealo, Kanado;** 8.-22.8. Dusemajna vojaĝo en Kartvelio, Tbiliso, Kartvelio; 10.-17.8. FESTO, Gresilljon, Francio; 15.-21.8. 22a Internacia Renkontiĝo en Pluezek, Plouézec, Francio; 22.-29.8. 87-a Itala Kongreso de Esperanto Assisi, Italio; 28.-31.8. 5-a ABELO Apud Berlina Esperanta LudadO, Berlin; 17.-20.9. Beneluksa Kongreso 2020, Charleroi, Belgio; 19.-27.9. Internacia Harz-pormensemajno laŭ itinero „Harzer Baudenstieg“; **2.-4.10. TORPEDO klerigseminario Herzberg; 18.-23.10. EMA Herbstwanderung im Wendland, Hitzacker; 23.-25.10. DEB-Verbandsratssitzung Herzberg;** 2021: **17.-24.7. 106. Universala Kongreso, Belfast, Nord-Irlando**


Jarĉefkunveno 2/19


15-a BIERO en Chotěboř, Ĉeĥio 4/19


Kuna manĝado en Hanovro 5/19


BARO sur la Finkenborn, Hameln 6/19



GEK en Neumünster 6/19

## 16-a Rata Rendevuo en Einbeck

Jam la 16-an fojon la Esperanto-grupo Hameleno (Hameln) invitis geamikojn el la najbaraj grupoj en Hannover, Detmold, Bielefeld kaj Paderborn al la Rata Rendevuo. Sed kelkaj el la ĉ. 20 partoprenantoj prenis pli longan vojon kaj venis el Marburg kaj Hanau en la sudo kaj Nordenham en la nordo. Ĉi-foje oni vizitis la bieran kaj mustardan urbon Einbeck. Ĉar vizito de la bierfabriko semajnfine bedaŭrinde ne eblis, oni povis gustumi la faman bieron nur dum la rustikala tagmanĝo en la restoracio „Brodhaus“. Kaj ankaŭ la loka mustarda supo kaj mustarda eskalopo tie gustis bonege. Jam matene oni salutis unu la aliajn en la glaciaĵejo „Dolomiti“ kaj tuj poste oni iris al la PS.Speicher. En tiu ekspozicio pri la historio de la rado la tempo pasis rapidege kaj multajn ekspoziciaĵojn oni eĉ ne povis vidi. Tre vigle kaj entuziasme la ĉiĉerono rakontis rakontetojn kaj anekdotojn pri la unuopaj veturiloj: pri la barono de Drais, kiu



Informstando ĉe Germana Evangelia Foiro en Dortmund 6/19


Gardena festo ĉe Klaus kaj Waltraut 6/19